3.ª JARO N.º 32 DUONMONATA ESPERANTO-GAZETO 15 FEBRUARO 1938

# PoPola Fronto

INFORMA BULTENO INTERNACIA PRI HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŜISMO

ELDONO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA VALENCIA (Hispanio)
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: STRATO MAR, NUM. 25

## JE DEK METROJ...

Antaŭ unu semajno, Valencio suferis teruran bombardadon de faŝistaj aviadiloj, kiuj semis la morton tra nia kvartalo. Ĉe najbara stratangulo, je dek metroj de nia redakcio, falis k eksplodis unu bombo. Senkulpa sango de preterpaŝantoj makulis la pavimon de nia trotuaro. La fasado de nia domo—antikva nobela palaco—skue tremegis; la tuta konstruaĵo krakis, sed brave tuj ĝi reakiris sian normalan vertikalecon, sen ia difekto, niaflanke, krom brua disfalo de fenestraj kristaloj, sur la kapon de unu redaktoro, k plia aldono de kelkaj «gloraj» ŝirtruoj en la veterana tuko de nia verda standardo, kiu dekolorigita—pro la suno, la vento k la pluvo de multaj monatoj—estas konstante flirtante ĉe la centra balkono.

Ni ja scias, ke estas tre vulgare—k eĉ jam enuige -priskribi la malagrablajn efikojn de unu bombo. Tamen, ĉar en tiu lasta incidento, kune kun la vivo de kelkaj prilaborantoj de nia entrepreno, estis en grava risko je abrupta pereo la revuo mem, ĝi ne povas forigi la tenton fanfaroneti pri la spertita danĝero. Tro naiva k infana povas ŝajni la pretendo, sed neniel estas superflue pliviligi, per aktualaj travivitaj emocioj, la presitan paperon, kiu duonmonate vizitas la pacajn sekurajn hejmojn de kelkaj miloj da eksterlandaj esperantistoj.

Ni ne estas vantaj amatoroj nek profesiaj agitistoj. Ni estas sentemaj homoj, kiuj, spertante proksime—je dek metroj!—la abomenojn de l' Faŝismo, deziras eviti per niaj avertoj alies similajn suferojn Granda kontingento da kamaradoj el nia Grupo deĵoras en la tranĉeoj. Dum ili kuraĝe batalas, ni, ankoraŭ tro junaj, aŭ bedaŭrinde jam tro maljunaj por aktivaj militistaj servoj, skribas fervore artikolojn pri la granita unueco de la tuta hispana popolo—*de la tuta hispana popolo!*—en lukto kontraŭ la sklaveco, kontraŭ la reakcio, kontraŭ la fanatikuloj, el ĉiuj koloroj, kiuj neas k reneas la ekzistantan harmonion, ĉar iliaj strabaj okuloj preferas rigardi unuecon en la fosaĵo de tombo ol en vicoj de batalo por la ĝojo k la vivo...

Sub komuna signo, Hispanio sopiras, laboras, batalas k venkos. Por tamburi tiun ĉi veron, nia bulteno estas plia parapeto, ne libera je minacoj ĉar, se hospitalo k lernejo, por la faŝistaj aviadiloj, estas elektindaj celoj; redakcio de Esperanto-gazeto, kiel bonfara institucio, ne volas ne havi rajton magnete logi la bombojn, almenaŭ laŭ unu distanco minimuma je dek metroj...



## KOMENTARIO SEN EMOCIO

La ekstera politiko de la faŝistaj ŝtatoj baziĝas nur sur ĉantaĝoj. Iliaj soldatoj k iliaj diplomatoj estas nur dresitaj instrumentoj por tragikaj fanfaronaĵoj; ludoj pli danĝeraj, kompreneble, ol minacoj de apaĉo en mezo de diboĉejo ĉar, kontraŭ la agoj de apaĉo aŭ kontraŭ la skandaloj de diboĉejo, ekzistas polico k funkcias regulo; sed kontraŭ la krimoj de l' Faŝismo nur ekzistas la kakatuaj paroladoj de lerte maskitaj kolegoj. Hodiaŭ, kun la evoluo de metodoj, la apaĉoj povas grimpi en la seĝojn de regnestroj. En tiu supera rango, por rabi k murdi adekvate, simpla ponardo aŭ modesta tranĉilo ne sufiĉas. Aplikante frenezajn teoriojn k fiuzante la ŝviton de siaj sklavigitaj popoloj, ili akumulas fusilojn, kanonojn k aviadilojn por ataki malfortajn landojn aŭ fidemajn naciojn, kiuj, kulturante la pacon, ne zorgis akrigi siajn ungojn, supozante erare, ke ilia propra, klara k honesta, sinteno estus jam sufiĉa ŝildo.

La Faŝismo, honto de nia epoko, regas per la teroro k vivas per la ĉantaĝo. Aktive ĝi ofendas malfortulojn k hipokrite ĝi salutas la fortulojn, sperte sciante ke, la ĉefaj potencoj nur scias «neŭtrale» rigardi la spektaklon. La pacemaj landoj—Hispanio inter ili—pagas nun terure la eraron neglekti la rajton de la forto por fidi je la forto de la rajto. Nia popolo, devige batalante, ankoraŭ melankolie kredas, ke la unueco de la internacia despotismo estus nenio antaŭ la unueco de la internacia proletaro... Tio estus logike...

Sed la logiko fiaskis; la kapitalismo ne multe hezitas inter libero de banditoj aŭ libero de civitanoj, dum la civitanoj ŝajnas preferi la falsan pacon de latenta milito ol efektivan pacon per puno al ĉiu provokinto. La Faŝismo ruze profitas tiun naturan timon je la milito, por fari militon laŭplaĉe k, eĉ ankoraŭ pli absurde, por fabriki batalilojn per la mono de la estontaj viktimoj. Publika estas jam la intenco de Mussolini akiri prunton en Anglio, por aĉeti la materialon el kiu konsistas la torpedoj, kiuj dronigas la anglajn ŝipojn, kun anglaj ŝipanoj, en la akvon de la Mediteraneo...

Mussolini urĝe bezonas monon. La ekonomio de Italio estas en plena bankroto, pro la milito en Abisenio k pro la aventuro en Hispanio. Nun, preskaŭ la tuta komerca ŝiparo veturas, je la servo de Franko, transportante soldatojn k materialon. Dum la unuaj naŭ monatoj de pasinta jaro, Italio importis varojn laŭ valoro de 10.118 milionoj da liroj k la eksportaĵoj nur kalkulis 5.706 milionojn da liroj, spite al fakto, ke ĉesis rigore la importado de krudaĵoj, kies sekvo estas terura vivkondiĉo por ĉiuj laboristoj, kamparanoj k etburĝoj. Sub tia signo, la despoto sin turnas al riĉaj—pli aŭ malpli semidaj—bankieroj de Londono, kie la miasmoj de putra komitato estas loga odoro por kunveno de la korvoj. Oni marĉandas pri kondiĉoj de la prunto. Oni «oficiale» postulas la retiriĝon de la «volontuloj» el Hispanio; sed tio estas nur vualo de la intrigo. Mussolini promesos ĉion k plenumos nenion; finfine li ricevos abundan monon por intensigi la intervenon k pliviligi la piratadon. Tiamaniere la famo, se ne la konscienco, de s-ro Eden restos senmakula...

Tra la senemocieco de ĉi tiuj komentarioj, pri temoj tro materiaj, ni ne volas paroli pri heroaĵoj nek pri patosaj suferoj. Ni menciu nur, kiel broĉon, la arogan deklaron de nia ĉefministro, k ministro de financoj, doktoro Negrin, emfazante en kunveno de la Parlamento, ke Hispanio elportas, laŭ propraj rimedoj, sian lukton kontraŭ la naciaj ribeluloj k la fremdaj invadintoj. Jes! eĉ pri financoj reliefas kontrasto inter ni k la faŝistoj. Hispanio ne almozas krediton, ĝia Registaro nur petas, kun oro en la mano, rajton por aĉeti defendilojn, kiuj eble povas taŭgi por defendi ne nur la liberon de la hispanoj, sed ankaŭ la interesojn de tiuj, kiuj stulte ĝenas la triumfon de nia Respubliko.

Kalkulante je nia pereo, la bankieroj ne faros negocon, ĉar... ni ne pereos!

# EĈ LA FILINO DE FRANKO SUFERAS PRO SIA PATRO

Oni ĵus scias, ke la filino—ankoraŭ infanino—de la perfidulo Franko, gastis, dum kelka tempo, ĉe la sidejo de la francaj monaĥinoj «Filinoj de la Kruco» en Bayone (Francio).

Ŝi loĝis tie kun fiktiva nomo k tonditaj haroj; oni faris tion por malfaciligi ŝian rekonon laŭ ajna publika portreto. Per tia procedo, ŝi restis tute nekonata. Sed, subite en la monaĥinejo okazis io, kio interrompis la ordinaran trankvilecon:

Sekve de la detruado k teroro, kiujn Franko senbridigis sur Baskion, miloj da homaj estaĵoj, laboremaj k honestaj, forlasis siajn hejmojn k serĉis rifuĝon en Francio. Kun la migrantoj, elŝipiĝis en la haveno de Bayone kelkaj malfeliĉaj orfaj infaninoj, kies gepatroj mortis pro la krimoj de Franko. Hazarde, oni ilin instalis ĉe la sama restadejo, kie loĝis bone gardata la filino de la ĉefa ribelestro.


Grava okazintaĵo regis, en la monaĥinejo, pro la veno de la orfinoj, kiuj, pridemanditaj de ĉiuj aliaj infaninoj, rakontis plendetale la terurojn, kiujn ili mem spertis tra la baska regiono. Ili kortuŝe priskribis la eksplodojn, la incendiojn, la pafadojn de la aviadiloj kontraŭ la civila loĝantaro, la absolutan detruadon de estimataj urboj, la disfalon de ŝatata hejmo, la morton de la patrino, la pereon de la patro, la angorajn muĝojn de la bovino... La naivaj voĉetoj rakontis k rakontadis... La filino aŭdis k aŭdadis emocie la patosajn aventurojn de la baskaj infaninoj, konsfateblaj viktimoj de la homo, kies saman nomon ŝi havas. Ŝi penis kaŝi siajn larmojn. Ŝi suferis profunde ĉar subita malkovro de la vero estis, en ŝia koro, rekta malkovro de la monstreco de ŝia patro.

La senkulpa idino de la murdisto demandis, kun angoro, ĉu la rakontoj estis faktaj, ĉu tiuj teruroj reale okazis... La kompatemaj monaĥinoj konsolis ŝin, sed ili ne povis forstreki la veron. La efiko de la rakonto baldaŭ aperis ĉe la farto de la infanino: noktoj sen dormo, manko de apetito, nerva plorado, intima suferado. Ŝia sano estis en grava danĝero, la drasta impreso minacis detrui ŝian delikatan organismon. La familio decidis rapide rehejmigi ŝin por eviti ŝian morton...

Jen kruda epizodo en la propra familio de ĉefa kanajlo. Lertaj artifikoj k absurdaj mensogoj vane klopodis mildigi aŭ vuali abomenojn. Tiel nerefuteblaj estas la krimoj, ke eĉ la propra filino de ties respondeca aŭtoro ne povas rezisti la naŭzon, kiun oni sentas, kiam oni konscias pri la vera vizaĝo de la granda malbeno, kia estas la Faŝismo, kiel honto por la Civilizo.

## ĈIAM MALPERMESANTE...

Kiel pruvon, pri la sistema persekutado kontraŭ la sentoj de la diversaj hispanaj regionoj, oni konfirmas malpermeson, sub averto de severaj punoj, de la lingvo baska, kiel ankaŭ de la uzado de la tipaj kostumoj. Kiel sciigite, la baskoj tradicie amas sian lingvon k morojn; k la malpermeso trafas eĉ la religiajn servojn. Tio ĉi kontraŭstaras la leĝojn de la Katolika Eklezio mem. Estas konstatinde, ke en granda plimulto da vilaĝoj k vilaĝetoj de Baskio, tiu ordono estos malfacile obeata, ĉar la enloĝantoj ne konas la kastilan lingvon; sekve de tiu nescio, okazos certe multaj punoj. Tiu ĉi rigora ordono sekvas tiun de malpermeso, en la frankista zono, al uzado de la kataluna lingvo, por la katalunoj tie loĝantaj. Esperanto atendas en vico...



Neniu en Hispanio rifuzas okupi sian lokon por defendi la liberon. Ennultaj lernejoj, la infaninoj, diligente k kontente, trikas lanajn ŝtrumpetojn por la bravaj soldatoj de Hispanio.

## ABSOLUTE NORMALE...

Daŭras la sugestoj k proponoj, en diversaj landoj, por eviti bombardadojn kontraŭ ariergardaj urboj. Ministroj k deputitoj daŭre babilas k babilas... dum bomboj daŭre falas k falas sur virinojn k infanojn...

## POZITIVA LABORO DE LA U.G.T.

La kamparanoj de la vilaĝo Castuera (Ekstremaduro) proksime al portugala landlimo, suferis tre malaltan, mizeran, vivnivelon. La grundo, kiun ili kulturas estis savata dank' al bajonetoj de la Respubliko, k ili konservas ĝin nur dank' al niaj trupoj, kiuj deĵoras en apuda fronto. Nun alvenas al ni jena sciigo: «La kamparana kolektivigo de Castuera ĵus donacis al Ministro pri Nacia Defendo la sumon da 50.000 ptoj. por militaj elspezoj». Ĉar tiu donaco estas parto de gajnoj, tio pruvas, ke la kamparanoj bone laboras, k plie, ke la kamparanoj, bone organizitaj, kreas riĉaĵojn.

Tiu fakto, kompreneble, estas emociiga. Nin kaptas la emocio konstati seriozan organizkapablon, firman, konstantan laborsistemon k trafan ekzemplon por ĉiuj.

Tiuj kamparanoj, apartenantaj al sindikata organizo U. G. T., estas tiuj samaj, kiuj antaŭe estis ĉiam akuzataj k persekutataj, kiel mallaboremaj, pro kverelemaj akuzoj. Sennombraj falsaĵoj estis utiligataj por pravigi persekutadon de la Civilgvardianoj al ili. Kaj nun, venas milito; la tero k la brutaro restas sub iliaj manoj k ĉiuj kredis, ke grava fiasko baldaŭ aperos.

Sed jen la bilanco, kiun la kolektivigo prezentas: Ĝi temas pri la jaroj 1936-37. Laboristoj: 450; kvitigo de ricevitaj pruntoj: 419.700 ptoj; finfina rezulto: 1.237.014 ptoj. da gajno; donacoj faritaj de la Kolektivigo: 12.000 ptoj. al Hospitalo; 25.000 ptoj. al rifuĝintoj; 50.000 ptoj. al Ministro pri Nacia Defendo por militaj elspezoj k 10.000 ptoj. al vidvinoj. La cetera kvanto da gajno estas destinata al plibonigo de laboriloj.

Certe, tiuj kamparanoj ne estas la solaj, kiuj sukcesis en organizo de laboro, sed ni reliefigas tiujn detalojn, kiujn ni ĵus konis, pruvante, ke la Prezidanto de nia Registaro D-ro. Negrin pravas, kiam li asertas, ke ni gajnos la militon, ne nur pro agado de nia Popola Armeo, sed ankaŭ per la persisto k senĉesa pligrandigo de aktiva laboro en nia vigla ariergardo.

## LA LIBERECANA JUNULARO KONGRESAS

En sindikata ejo de Valencio, okazas nun, kun granda entuziasmo, la Nacia Kongreso de la Liberecana Junularo. Oni devas akcenti, ke ĉiuj temoj prezentas pozitivan k seriozan enhavon, kiel decas al la novaj normoj tra la ĝenerala situacio de Hispanio.

# MOZAIKO

● Pri la letero, subskribita de la episkopo de Teruel, kiun ni diskonigis al niaj legantoj, per unu el niaj lastaj numeroj, jen kion skribis faŝista gazeto el Cadiz: «Malbenataj estu, de Dio k de Hispanio, ne nur la ruĝuloj sed ankaŭ tiuj, el niaj vicoj, kiuj emociiĝas antaŭ la fanfaronaj humanecaj agoj de la bolŝevika kanajlaro.» La taskon komenti ni lasas al niaj katolikaj legantoj.

● Itala gazeto *Giornale d'Italia*, de la 16. Januaro, tute senĝene asertas: «Ni ripetos niajn venkojn de Malago, Bilbao k Santander, en Gvadalajaro.» Ne parolus tiamaniere la cinikuloj, se ne silentadus hontinde aliaj.

● Faŝista gazeto aperanta en Bilbao publikigis artikolon, verkita de hispana nobelo, markizo de Lozoya, al kiu apartenas la sekvanta paragrafo: «Ĉiuj malfeliĉoj de Hispanio devenas pro la stulta manio de kelkaj registoj lernigi la hispanojn legi. Instrui homon, pri legado, nur taŭgas por faciligi al li la kapablon asimili la venenon, kiu kaŭzas lian malfeliĉon k tiun de lia patrio.» Certe la vorto *kreteno* estas tro laŭda por esti aplikata al la aŭtoro de ĉi tiu specimeno de faŝista kulturfobio.

● La saman tagon, kiam, tagmeze, la murdistaj aviadiloj mortigis en nia urbo 125 personojn k vundis 208 aliajn, unu grupo da respublikanoj intencis albatali en Teruela fronto du grupojn da germanaj aviadiloj. Malgraŭ la nombra supereco, la faŝistoj «kuraĝe» forkuris, laŭkutime.

● Ni ne deziras komenti la eksplodon de bomboj en Villejuif, apud Parizo, sed ni ne povas silenti, ke tiu okazintaĵo klare pravigas niajn antaŭajn asertojn: Nia hispana lukto kontraŭ la faŝismo naskas nepre la bezonon albatali ĉie la faŝismon.

● Kelkaj ĉi tieaj organizoj publike proponis, havigi ordenon al la ministro pri Nacia Defendo, pro la lastaj sukcesoj de nia Popola Armeo. La Prezidanto de nia Registaro, doktoro Negrin, publikigis jenan respondon: «Sendube ne scias la bonegan sentemon de certaj personoj, tiuj, kiuj pro sia homa k natura entuziasmo, proponas omaĝajn honorojn, kiuj ne estos akceptataj, kvankam ni ĉiuj scias, ke ili estas ĝustaj. Sed la Registaro opinias, ke siaj membroj ne devas akcepti, dum la daŭro de nunaj cirkonstancoj, aliajn omaĝojn al tiujn, kiujn ĉiutage liveras al ili la plenumo de lia honesta devo.»

● Oni sciigas, el Londono, ke grupo de anglaj artistoj k verkistoj, kiuj jam intencis vojaĝi al respublika Hispanio, por konstati propraokule la situacion de niaj diversgradaj lernejoj, ne sukcesis ricevi la koncernan permeson de la Angla ministerio por eksteraj aferoj. Ili estis devigataj rezigni la vojaĝon k la inviton de la hispana Registaro. Jen pruvo pri «amikeco» de la anglaj politikistoj.

● La franca katolika ĵurnalo *L'Ordre* diras: «Ni povas certigi, ke la ĵusa interkonsento italo-germana decidas pri tuja sendo al Hispanio de 50.000 italaj soldatoj. Germanio ne liveros soldatojn, sed ĝi provizos je la militmaterialo, t. e., kanonoj, municio, telegrafiloj, aŭtomobiloj, kampanjaj fervojoj k aliaj produktoj. Ĝi provizos ne nur la nunajn trupojn de Franko, sed ankaŭ la italajn sendotajn trupojn.»

● El Tanger oni komunikas, ke la itala vaporŝipo «Firenze» kiu vojaĝis de Maljorko al Seviljo, haltis en Tanger. 20 aviadilaj meĥanikistoj ricevis permeson viziti la urbon k tuj, kiam ili ĝin eniris, vizitis hispanan konsulejon petante, ke oni sendu ilin al respublika hispana zono. Laŭ iliaj deklaroj, 12 trimotoraj aeroplanoj por bombardado alvenis ĵus en Maljorko, kie jam ekzistis 80 italaj k 15 germanaj, plej modernaj, aviadiloj.

● Dum la festoj en Romo, okaze de la datreveno de faŝistaj milicoj, Mussolini disdonacis premiojn al oficiroj k soldatoj, kiuj partoprenis la militojn de Abisenio k Hispanio. Poste, li faris paroladon, al kiu apartenas jenaj paragrafoj: «En Abisenio k en Hispanio la faŝistaj legianoj elverŝis sian sangon. Ili estas pretaj montri sian kapablecon en pli gravaj bataloj; ili nur atendas ordonon!» «Faŝista Italio estas fortal Ĝi havas multajn armilojn k pli grandan kvanton da viroj por ilin utiligi en sensaciaj servoj!»

● El Praha oni sciigas, ke aranĝoj komencis por starigi fortan Popolfronton. Eble ĝin partoprenos socialistoj, komunistoj, liberalaj katolikoj k aliaj. Ni ĝojas konstati, ke en la amika respubliko oni komencas ĝuste taksi la danĝeron k oni efike sin preparas.

● Faŝismo uzas plej perfektajn metodojn por regi la popolan opinion. Pri informado ni diskonigas efikan pruvon: En itala gazeto *Regime Fascista* la ĵurnalisto Farinacci, responde al asertoj de kelkaj francaj ĵurnalistoj, kiuj komentis nian venkon en Teruel laŭdante generalon Rojo, asertas jenon: «Tri tagojn post tiuj laŭdoj, generalo Rojo estis kaptita en Teruel de la naciistaj trupoj.» Generalo Rojo, kiu estras nian stabon, bonfartas k laboras senĉese por la bono de nia lukto. Jen kiamaniere estas informata la itala malfeliĉa popolo.

● De kiam la faŝistoj eniris la urbon Malago, estas murditaj 2154 virinoj, 798 infanoj k 6832 viroj. Tiu kruela rekordo estas atingita honore al «civiliza» tasko.

● En Madrido, distrikta Socialista Klubo inaŭguris lernejon en la domo, kie loĝis la perfida politikisto Lerroux. En la domo, kie tiom da perfidoj estis preparataj, kie loĝis malamikoj de laborista klaso, nia junularo povos tute senĝene lerni k evolui.

● Ĵus ni sciiĝas pri nova faŝista metodo, kiun Mussolini aplikas por ekspluatado de itala popolo. Post kelkaj tagoj, estos sendataj al Germanio 30.000 italaj kamparanoj, kiuj prilaboros la germanajn kampojn. La salajroj estos enspezataj de itala registaro, kiu pagos al familianoj per liroj. Tiamaniere itala registaro estos helpata malpliigi la komercan deficiton kun Germanio.

● Jen interesega sciigo, kiun ni elĉerpas el francaj faŝistaj gazetoj: «La *Kompanio de Jesuo* kunsidis en Loyola. La jezuitoj, post koncerna konsulto al Vaticano k al ilia Generalo, studis la papan enciklikon kontraŭ la Faŝismo k ili estas pretaj forlasi amase la naciistan Hispanion.» Ĉu temas pri ratoj, kiuj forlasas la ŝipon antaŭ ol ĝi dronu?

● La itala gazeto *Il Messagero* sciigas, ke pro lia laboro en «la ĉielo de Hispanio» la leŭtenanto Bruno Mussolini estas pligradigita. Estas la unua fojo, kiam itala gazeto agnoskas, ke tiu filo de la «cezaro» luktis helpe al Franko. Kiam niaj gazetoj tion asertis, ili diris, ke temas pri kalumnio k mensogo!

● Freŝaj sciigoj diras, ke la serioza institucio Ruĝa Kruco Internacia ĵus estas malpermesita funkciadi en la faŝista teritorio de Hispanio.

## HALADZO EN ĜENEVO

Malfeliĉa Societo de Nacioj! Ĝia centa kunveno flodoras je kadavro. En Ĝenevo regas, laŭ tradicia submetiĝo, tiuj mem, kiuj forkuris el Ĝenevo! La diplomataj tenoroj k basoj ĵus kunkantis stultajn melodiojn. Oni ne parolis pri Hispanio, nek pri Ĉinio, nek pri la angora situacio de la judoj persekutataj... Ho, kia honto! La Institucio, kreita por solvi la konfliktojn, jam eĉ ne kuraĝas nun «scii» ke ekzistas konfliktoj. Pravigitaj plendoj ŝajnas almozpetado. Kiel oportuna estus la eksplodo de kelkaj bomboj, apud la ĉarmaj bordoj de la lago Leman...

**La sukceso kaj progreso de Esperanto certe dependas nur de la esperantistoj mem!**

**FRUNTO.**—Esperanto, kiel lingvo, taŭgas por esprimi plej malsamajn emociojn, sen atento pri ties pravo k malpravo. Laŭ sama sintakso, fluas plendoj de ofendito k rikanoj de ofendanto; ĝemoj de viktimo k insultoj de fripono, ĉar Esperanto estas lingvo kun preĝoj k blasfemoj! Per Esperanto—bedaŭrinde aŭ ne, sed fakte—oni povas stimuli rasojn persekutojn k pravigi invadojn en liberajn landojn...

LA PARLAMENTO REGULE KUNVENIS

# LA ĈEFMINISTRO SINCERE PAROLIS

**En plenumo de konstitucia regulo, la 1. de Februaro kunvenis la hispana Parlamento, kun ĉeesto-kiel honoraj gastoj de pluraj delegacioj el diverslandaj deputitoj. Doktoro Negrín, estro de la Registaro, faris resumon de la situacio k studis konkretajn aspektojn de nia milito. Ni prezentas traduke la finaĵon de lia diskurso, kiu certe plaĉos al niaj internaciaj legantoj.**

Mi ne volas diri multajn vortojn pri la eksterlanda fronto; pri la internacia politiko. Iu tiel nomata diskreteco—robo de eŭfemismo, kiam ne de mensogo—estas la stilo, kiun ordinare postulas ĉi tiu temo. Sed la krudeco de la nunaj momentoj ne kongruas kun tiu normo, nek la popolo akceptus tiun slangon. Tial, ĉar la kutimo faris, ke la nuda vero ŝajnas fanfaronaĵo, nur oni devas uzi ĝin, kiam tio baziĝas sur nerefuteblaj k masive solidaj argumentoj.

Hispanio ne volas kaŝi, dum milito, tion, kion ĝi ne kaŝis dum la paco. Mi celas do, nur montri nian sintenon k precizigi tiurilate la plej reliefajn punktojn. Ni restas, malgraŭ ĉiaj malgraŭaĵoj, fidelaj al la Ligo de Nacioj. Tion trudas al ni nia propra Konstitucio; k eĉ sen tiu leĝa postulo, nia espero ne velkus, ke la Ligo de Nacioj eliros libere de la malfacilaj fluoj, tra kiuj ĝi baraktas. Ĝia krizo ne ekzistas pro la amplekso de ĝiaj celoj, nek pro la vasteco de ĝiaj ambicioj. Nel Tute kontraŭe. La krizo ekzistas pro neplenumo de ĝia misio, pro forgeso de ĝiaj fundamentaj devoj. Abisenio, Hispanio k Ĉinio: Jen la eraroj, jen la etapoj sur la vojo fatale kondukanta, se ne okazas trafa direktoŝanĝo, al sklaveco en ĉiuj liberaj landoj.

Germanio k Italio atencis kontraŭ nil Tion jam neniu kuraĝas neadi. Nur tion mem ni prezentis al la Ligo de Nacioj. Observu bone, ke ni ne plendis tie pri la interna problemo nek pri la skuoj de la privata konflikto. Estas necese—nepre necese!—deklari, ke la plej rekta minaco, kontraŭ la paco de la mondo, tute ne estas la civila milito de Hispanio. Ho, nel La plej akuta minaco, kontraŭ la universala paco, estas la malnobla atenco, kiun faris al ni kelkaj landoj, kun kiuj ni havis nenian antagonismon (kiel jam deklaris la Prezidanto de la Respubliko, dum solena cirkonstanco). Jesl Kelkaj landoj, kiuj preparis, helpis k ŝveligis la ribelon erare pensante, ke per tio ili povus subpremi Hispanion. Kiam la komenca plano ne taŭgis, kiam la intrigo fiaskis, tiam ili ne hezitis malkaŝe interveni...

En tiu etapo, du grandaj ŝtatoj montris eksterordinare sian estimon al Hispanio: mi parolas pri Sovetio k Meksikio; al ambaŭ mi esprimas nun, kiel alifoje, la sinceran dankon de la Registaro k de la popolo de Hispanio.

Ĉe fino de Novembro, la Komitato pri la Ne-Interveno sendis noton, per kiu oni petis al ni permeson por ke oficiala komisiono povu viziti la du zonojn de Hispanio, por prepari la kondiĉojn pri la retiriĝo de ĉiuj volontuloj. La Registaro akceptis principe la sugeston por eviti la pretekston, ke ni malhelpas la retiriĝon. Sed, akceptante la ideon, neniel ni ja metis ĝin super la nediskuteblaj rajtoj de la Respubliko, kiel simbolo de la volo de tuta popolo.

Mi ne volas ankaŭ nun preterlasi la okazon atentigi vin pri certa malklara manovro, kiu, ne unuan fojon, rampas ĉe kelkaj politikaj medioj. La malamiko ne ŝparas rimedojn por subfoŝi la graniton de nia ariergardo. Kun tiu celo, oni disflustras gajajn aŭgurojn pri tuja kompromiso, sub kondiĉo de cedoj, niaflanke, al ekonomiaj k politikaj klaŭzoj por ĉesigi la militon. Solene mi volas aserti, ke la grupo da homoj, sidantaj sur la ministraj seĝoj en la legitima Registaro, neniam lasos sin logi de la fiaj sibloj de tia tento. Neniaml ĉar ni estus la unuaj viktimoj de la intrigo. Ni hipotekus tiel la ekonomion k la estontecon de Hispanio. Neniam ni konsentos al tio. Neniam, eĉ se oni puŝas nin en tiu direktol

Se venas doloraj tagoj, eltenu la doloron k fidu je la venko. La milito, kun siaj naturaj zigzagoj, alterne liveras plaĉojn k suferojn. Ĝis antaŭ nelonge, niaj tagoj estis angore amaraj. Sed la unua etapo jam estas superita! Ankaŭ ni superos la nunajn k la postajn ĉapitrojn. Tiam ni ekpaŝos sur la marmora ŝtuparo de la triumfo, por ĝuadi ĝin kun la humaneco, kiun ni devas apliki, pro la tre noblaj kvalitoj de nia propra afero. Se ia negativeco restas en nia programo, estu nur tiu de la ekstermado; tion ni ne ŝatas, tial ke ni tion ne komprenas!

Ĉiu, kiu submetiĝos al la aŭtoritato de la leĝo, povos atendi, post venko de la Respubliko, la ĝuon de nia pardonemo, ĉar la flago, kiun ni hisos en la stango plej alta, en momento plej solena, ne akceptas najbarecon kun funebraj vualoj.






# Oficiroj de la Popola Armeo

Kompare kun la ribelintaj armeestroj—tiuj obeantaj Franko-n k tiuj, kiuj en nia zono montriĝis malamikoj de la popolo—la elcento da generaloj, ĉefoj k oficiroj fidelaj al la Respubliko, restis tre eta. Tion oni povas facile kompreni, ĉar nia armeo estis armeo de feŭdaj kastoj, sen radikoj en popolaj tavoloj.

Tamen, ni konservis aron da militistaj profesiuloj, kiuj kondutis lojale. Ili komprenis la aspirojn de la popolo; ili kunsentis ties doloron k ties mizeron. Estis ankaŭ granda kvanto da eksoficiroj, kiuj, elportinte suferojn, pro siaj idealoj, estis eksigitaj aŭ devigitaj forlasi la armeon, dum la regado de la reakciuloj (fine de 1933.-komence de 1936.). Ili, tuj ĉe la ekribelo, militistiĝis entuziasme, kun fervoro! Dank' al tiuj, kiuj denove eniĝis la armeon, kune kun la aliaj restintaj aktive en ĝiaj vicoj, ni povis disponi pri certa nombro da teknikistoj, kompetentuloj k fakuloj pri la diversaj armeaj specialecoj.

Per tiuj elementoj, oni komencis gvidi k «dresi» la milicanojn. Tiuj honestaj viroj ebligis la evoluan organizadon de la nuna Popola Armeo.

Oni ne multe konas, en la ekstera mondo, pri la streĉa klopodado krei bonajn oficirojn, novajn ĉefojn, freŝajn komandantojn, kapablajn laŭ postuloj de la bezonoj de la milito, por kontraŭstari la potencon de la bone ekipita—kun efika teknika gvidado—malamika armeo, estrata de multenombraj generaloj, el diversnacia konglomerato, kun Stabo de famaj k spertaj profesiuloj.

Kreiĝis modeste—unu post la alia, preskaŭ sen rimedoj—niaj Popolaj Militlernejoj. Spite al ĉiuj baroj, luktante kontraŭ ĉiajn malfacilaĵojn, la Militaj Akademioj ekfunkciis. Hodiaŭ, ni prave povas fieri pri ili. Ili ja estas modelaj laŭ ĉiu vidpunkto. Ili jam impresis forte multajn vizitantojn. Speciale, ĉiuj anglaj delegitoj (parlamentanoj, reprezentantoj de la Laborpartio k de la *Trade-Unions* k. c.) miris pro ilia organizo k laŭdis ilian praktikan rolon.

Ne plu ekzistas ĉe ni diverseco de kastoj en la armeo. Ordo, disciplino, interfratiĝo de profesoroj k lernantoj kamaradeco, komprenemo, komuna idealo.

Oni nur akceptas tie, por intensa studado, tiujn soldatojn, kiuj pruvis per siaj agoj en la batalfrontoj, ke ili posedas kvalitojn, kapablon, kuraĝon k firman ideologion. Proponitaj de siaj Brigadoj mem, ili rajtas viziti la fakajn kursojn por fariĝi bonaj oficiroj. En altgradaj klasoj, oni instruas oficirojn por akiri superajn konojn k ili atingas rangon je komandanto k. t. p.

Multe ni povus raporti tiurilate, sed ni ne celas fari longan priskribon, nur prezenti aspekton de nia lukto. Pri la spirito de la novaj oficiroj, forĝitaj en tiuj cirkonstancoj, ni montros, kiel pruvon, la ĉi-suban dokumenton, kiun ni rekopias el gazeto de unu el la Militlernejoj. Jen estas la teksto.

«Aldono al la Tagordo de la Lernejo en la tago 24. Januaro 1938. —Oni ĵus ricevis jenan leteron:

Batalfronto de Teruel, la 13. de Januaro 1938. K-do Direktoro de la Popola Militlernejo n.° 3.

Kara profesoro:

Per ĉi tiuj simplaj linioj, ni ĝojas saluti vin, kun fiero de homoj forĝitaj en tiu lernejo, kun ŝtala karaktero, ĉiumomente konsciaj pri sia devo, pretaj sin fordoni k fari tiom da oferoj, kiom postulos la batalo de nia popolo por ĝia libero.

Komenciĝis la operacioj la 15. Decembro, k ilin partoprenis la *** Bataliono de la ** Brigado, en ĉiuj atakoj k repuŝoj kontraŭ la malamiko ĉe la sieĝo al Teruel. Tie la kampo restis tute kovrita per mitralo. Miloj k miloj da kanonpafoj plenigis ĉion, disrompante la tranĉeojn, sed ĉiam, kiam la malamiko ekatakis renkontis la brustojn de la heroaj soldatoj de nia bataliono, kiuj rezistis sub la komando de la lastaj kvar oficiroj, restantaj el la tuta estraro de la bataliono. Ĉiuj kvar—ni mem—devenas el tiu glora lernejo, k ni konfirmas nian decidon morti antaŭ ol makuli la titolon de nia amata Lernejo. Ĝis revido, kun deziro premi vian patrecan manon, ni restas tutkore viaj. I. S.—R. P.—A. M.—G. M.

Tiu ĉi letero, modelo pri spiritostato de laboristoj, kiuj unuan fojon batalas por ili mem, fidele spegulas tion, kion oni instruas en nia Lernejo k vigle emociigas min. Mi tre fieras pri ĝi. Estas escepta honoro gvidi Lernejon, kiu produktas tiajn homojn. Mi gratulas ĉiujn, ĉefojn, oficirojn k soldatojn, pro ilia bonega laboro, kiel profesoroj k lernantoj. Nome de la Lernejo, mi sendas memoraĵon pri amo k paco al la falintoj, k plej bonajn dezirojn al tiuj, kiuj antaŭ la malamiko, celas la venkon de la Libero. Mia resuma krio estas: VIVU LA RESPUBLIKO!

*La Direktoro*

**DORSO.**—Esperanto, kiel idealo, celas harmonion k pacon. Sed tiu feliĉa stato neniam regos, se oni ne evitas unue la ĝemojn de viktimoj per justa puno al la friponoj. Ekster la honesteco aŭ la malhonesteco, neniu sidas. Esperantisto, kiu stimulas rasajn persekutojn k pravigas invadojn en liberajn landojn, rajtas esti esperantisto... kun titolo de rabisto, se li kaŝas kontrabandon sub mantelo de neŭtralismo!

LAŬ LA STILO ESTAS LA HOMO

# BABILADO DE EBRIEMULO



Tre ofte oni asertis, ke tiu generalo, kiu batalndis heroe k komforte, ĉiuvespere per la mikrofono de *Radio-Seviljo* estas escepta specimeno de kretenoj k ĉarlatanoj. Eĉ kelkaj eksterlandaj gazetoj okupiĝis pri la mondfama epilepsia «oratoro», Kejpo de Llano. Por ke niaj legantoj juĝu mem, pri la talentaj meritoj de tiu nekredebla histriono, ni presigas ĉi-sube fragmenton —stenografie alprenita—el lia klaĉado de la 20. Januaro:

«Kio estis motivo por ridi, tio estas la ektimo, kiun kaŭzis niaj aviadistoj al la cinikuloj. Mi aludas tiujn anglajn laboristajn parlamentanojn, kiuj venas al Hispanio, por manĝegi senpage tion, kio mankas al la malsata loĝantaro; kiuj venas forpreni bonegajn sterlingajn funtojn, pro siaj vojaĝelspezoj k por enkasigi monon pro la paroladoj farotaj en Britio, per kiuj ili provos konvinki la popolon pri la malo de la vero jam bone konata, ĉar la angla popolo scias ja kion pensi. Ĝi scias tute bone, ke la marksista kanajlaro estas kolekto da sovaĝuloj, kiujn ni punos laŭbezone per indaj proceduj. Ili estas perfektaj sovaĝaj murdistoj k rabistoj, kiujn nur povas protekti k defendi aliaj laboristoj, aliaj senhontuloj, kiaj ili ja estas... La malŝatinduloj veturis Valencion k ĉe ilia eliro de akcepta kunveno, niaj aeroplanoj disĵetadis ion—ne florojn, kompreneble—sur la stratojn, kiujn ili trairis, disrompante unu el iliaj aŭtomobiloj, sed laŭdire ĉiuj restis senvundaj... Domaĝe... ke nenio okazis al ili! Pripensu nun, kion ili raportos en Anglio, ĉar jam en Madrido ili komencis protesti pri niaj bombardadoj. Ho ve! Ili diras emfaze, ke ni bombardis sen iaspeca konsidero... Nu, se vi estus portintaj la flageton de la britaj laboristoj, oni ja respektus vin. Sed vi estis akompanataj de ŝafaro k ĉirkaŭataj de porkoj... kial do, ni povis vin respekti?»

Tiel gracie, elokvente k ĝentile kutimis batali la heroa generalo Kejpo de Llano ĉiuvespere en Seviljo.

Laŭ la vortoj, paralelas la faroj. Efektive, li estas unu el la plej senkoraj buĉistoj inter la bando da krimuloj, el kiuj konsistas la ribelinta grupo de generaloj. Lia krueleco rajtas esti komparata kun lia stulteco k estas nur superata de lia perfideco. Li estas do, perfekta bandito k faŝisto!

## VORTOJ DE KOMPETENTULOJ

La «Informa Bulteno de la Armea Stabo» asertas, en unu siaj lastaj periodaj komunikoj pri la operacioj, ke:

● «La milito ekŝanĝiĝas. Ĝi montras novan aspekton jam, ĉar ni ne plu estas amboso sed martelo. Kaj ni batos fortege, kun nevenkebla persisto, senhalte ĝis la venko.»

Tiuj esperigaj vortoj, post racia ekzameno de la situacio en diversaj frontoj k objektiva rigardo al la tujaj perspektivoj, donu niaj amikoj fidon por la estonto k instigon por aktiva helpo.


# LA SUDA STELO

MONATA ORGANO DE LA ESPERANTO-MOVADO EN JUGOSLAVIO

Kvankam neŭtrala gazeto, tre interesa por ĉiu progresema proleta esperantisto. Kvankam nacia organo, tre atentinda en la internacia esperantismo!

Petu informojn al ĝia redakcia adreso:

«La Suda Stelo» Slavonski Brod (Jugoslavio).


JUGOSLAVA KUNLABORO

# PER ZAMENHOFA ELTENEMO

Tre plezure ni aperigas ĉi-sube interesan artikolon, kiun el Beograd jus sendis al ni malrekte neŭtrala esperantisto, kiu, malgraŭ tio, devas kaŝi sian nomon per pseŭdonimo, dank' al la persekutoj de faŝistaj satelitoj en Jugoslavio.

La 1859. jaro brilos, inter la historiaj datoj montrintaj sur la firmamento aperon de tiuj homaj geniuloj, kies cerboj donis, dum ilia surtera vivo, la produktojn de eterna valoro. Zamenhof, alinome D-ro Esperanto, estis tia. Kaj, ne nur la strukturon de Internacia lingvo li donis, sed sian tutan vivon k animon li enspiradis en la lingvon por igi ĝin perfekta k, laŭ la ecoj de sia homamo, utiligebla por tuta homaro.—Tiel senĉese, senripoze ĝis sia vivofino...

---

...Kaj en tuta tempo posta, ĝis la nunaj tagoj, dum kiu jam du aktivaj generacioj da esperantistoj alportadis sian parton de sincera k sindona laboro por nobla celo de esperantisma ideo; historio de nia movado notas nur la danĝeron, direktata de multaj flankoj kontraŭ Esperanto-movado. Ja, kvazaŭ laŭ ia stranga natura regulo, ĉiu komencita nobla afero, plano aŭ ideo, inter la homoj, senevite reeĥis en formo de kontraŭstaro. Pasintaj esperantistoj eltenis la batojn diversajn, batalante per sia plumo, ĉar la atakoj estis ankaŭ de inteligenta speco; hodiaŭ, kiam esperantistoj devas elteni eĉ atakon de kruda perforto, por ne diri teroron, per kiu ilia afero estas minacata, ŝajnas esti bezonaj ankaŭ samspecaj rimedoj de sindefendo.

Kiel la esperantistoj, veraj bezonantoj de lingvo internacia, povos sin efike defendi? Esperantismo, krom la morala, alian forton ne disponas.

Se oni publike rekonas, hodiaŭ, ke la nigra danco de mallumaj fortoj reakciaj komencis denove, post ne tiom longa interrompo; la memdestiniĝo de vera esperantistaro estas problemo solvebla, estas demando de nelonga estonta tempo. La lasta k decida puŝo, en tiu direkto, eble ankoraŭ ne estas donita, sed la komencaj signoj jam klare vidiĝas sur la horizonto.

La homa lingvo, parolpovo, estas unu el la plej fortaj armiloj, kiel por sindefendo, tiel por la atako. En milita homara historio okazadis, k ankoraŭ okazas, perforta subpremado de ies nacia lingvo, flanke de gento momente disponanta la regadon super ĝi. Kaj, ankoraŭ hodiaŭ, la «Feniksoj» leviĝas el sia cindro.

En pasinteco de Esperanto, la movado ofte dependis de sinjoroj en diversaj, diru ni, esperantistaj kabinetoj; post la giganta—iuj certe bedaŭros ĝian troan rapidecon—paŝo antaŭen de moderna tekniko, kreinta perfektan, ideale rapidan, rektan k senperan ilaron por mensa komuniko, la popolamasoj fariĝis posedantoj ne de nuraj formoj: Volapük, Esperanto, Ido, Occidental, Mondial, Superlingua k kiom da ili ankoraŭ ekzistas, sed la posedantoj de utiligebla formo de internacia lingvo mem, elkristaliĝinta, el ĉiuj pereintaj k ankoraŭ ekzistantaj diversaj projektoj, en vivopovan formon de la plej sukcesinta nuna Esperanto.

Longe oni laboradis «por Esperanto»; baldaŭ oni efike batalos «per Esperanto»!

ZAMENHOFANO

Beograd (Jugoslavio).

# PETROLO

La eŭropa gazetaro komentas, diversmaniere, la eblajn rezultojn de venta kunsido de Ligo de Nacioj en Ĝenevo. Ni, kiel multaj, kredas, ke oni atingos nenian praktikan k efikan rezulton; la eŭropaj diplomataj rondoj sendube same opinias. Fakte, kio estas diskutata ne estas la detaloj organizaj de tiu pacsistemo, sed la regado sur la vojoj de l'Mediteraneo.

Germanio, unue rompis—facile k senbare—la Versajlan Traktaton, poste reokupis la Saar-teritorion, k nun ĝi preparas zorge sian ekspansion. Tiu klara k fatala politiko, t. e. la politiko de *Mitteleuropa*, estas iel helpata de la angla necedemo pri kolonioj. La ludo de tiu politiko kreis la artefaritan italan imperialismon Mussolini estas nun la plej obeema pulĉinelo en manoj de Hitler, kiu facile devigis la germanojn montri entuziasmon al grandomanioj de Mussolini.

La realigo de tiu politiko postulis, unue, altiri la atenton de Anglio, laŭ taktika direkto. Mussolini plenumis tiun bezonon minacante la britajn imperiajn vojojn. Dum, Germanio insistis, petante koloniojn, k preparis la necesajn kondiĉojn por doni grandan frapon en Centra-Eŭropo.

Ankaŭ postulis tiu kombino, ke estu donata samtempe alia grava fakto en Hispanio. Unue, pro la minerala riĉeco de ĝia grundo, k poste, pro tio ke el hispana marbordo oni povas facile minaci la vojojn de l' Mediteraneo, minacante Francion tra la sudo. La interna problemo de Hispanio—demokratio aŭ diktatoreco, faŝismo aŭ socialismo—provizis elementojn por dialektiko, sed ne konsistigas la veran kaŭzon de la interveno de Germanio k Italio en nia lando. Franko estis la perfidulo, kiun ĉiam naskas la Historio, en preciza momento, por liveri nacion al fremdaj ambicioj.

Germanio bezonis, por atingi sukcese la celon de planita ekspansio, krei danĝerojn al Anglio k Francio. Dank'al perfido de hispanaj militistoj, ili kovris la unuan etapon: Balearaj Insuloj. Poste, la Pirineoj konsistigas zonon de danĝeroj, sufiĉe grava, kiu permesas al Germanio daŭrigi senpune la manovradon. Mussolini, freneza je vanteco, ne ĝuste taksas la gravecon de la germanaj intencoj, kiuj donante al li la nefirman rajton mastrumi la Mediteraneon, igis lin malamiko de Anglio k faligis liajn apogojn aŭstro-hungarajn. La tradicia ambicio de Germanio, al tiu punkto de Eŭropo restas ankoraŭ aktuala.

Ĝis nun, tiu germana politiko duone sukcesis. La hispanaj mineraloj nutris germanajn rezervojn; hispana marbordo k hispanaj insuloj estas kvazaŭ germanaj postenoj el kie oni povas malhelpi la provizadon de petrolo al Anglio k Francio k protekti la suministron al Germanio k Italio.

La 32'50 % da petrolo, kiun ricevas Germanio, k 67 % da petrolo ricevata de Italio, alvenas tra la Mediteraneo. Ĉertigi ties ricevadon estas certigi ilian ekzistoeblon. Anglio k Francio povas ricevi fiun krudaĵon tra la Atlantiko. La fatala vorto *Petrolo* denove pezas sur la destino de Eŭropo, k Hispanio pagas sian parton.

La Ĝenevaj ĉarlatanoj perdas sian tempon, ĉar ili nenion evitos. Nur ili permesas per longedaŭraj kunsidoj k paroladoj ke la Staboj finaranĝu planojn. Tiu vero estas tiel videbla, ke la nacioj pliigas akcele la rearmadon k sin preparas al defendo k atako. Hispanio estas la unua batalkampo de la proksima ĝenerala milito.

## Heroo ignorata

Ho vi, heroo ignorata
En hispana land' rabata,
Honeste vi batalis
Kaj heroe vi falis,
Pro tutpopola idealo
En la sanganta valo.

Sed leviĝas monumento
Sub tiu firmamento,
Kie regas nun detruo
Kaj aŭdiĝas kanonbruo,
Al vi ĝi estas dediĉata,
Ho vi, heroo ignorata.

Ĉar vibradis via koro
Pro homa la doloro,
Sed liberon por akiri
Neniu devas miri
Ke spontane vi leviĝis
Dum ĉiel' flagriĝis

Ve, al brusto ŝtala
Vin trafis la fatala
Kuglo kaj la morto
Malhelpo de la sorto
Vin jetis al la valo
Dum sanga la batalo.

N. BABASKEROF

Lens (Francio).

# Letero el la Fronto

Batalfronto de Teruel,
5. Februaro 1938.

Karaj gekamaradoj! Sanon!

Mi fartas bone k restas tre kontenta. Viaj pakaĵoj k leteroj venis akurate. Mi neniel bezonas vintrajn vestaĵojn, ĉar tie ĉi ili abundas.

Hodiaŭ, mi havas malpli da laboro k volas rakonti, laŭ plenumo de mia promeso, ion pri miaj ĵusaj vojaĝoj al Teruel k pri la okazintaĵoj de la pasintaj sensaciaj tagoj. La malamiko ne volis kredi je nia disciplino k oni mensogis pri la kuraĝo de nia armeo.

Inter mi k ceteraj kamaradoj, regis plaĉo k fiero ĉar, nur per nia forto, ni rekonkeris tiun ĉi urbon el la ungegoj de l' Faŝismo. La libero k la socia justeco ekzistas denove ĉi tie! Teruel ŝajnas al mi multe pli bela k granda ol mi supozis. Bedaŭrinde, ne mankis scenoj pri doloro k mizero, tra la miloj k miloj da virinoj, kun infanoj, eltiritaj al la tiranio, al la teroro, kiu pretendis reteni ilin per krimaj procedoj k fiaj mensogoj.

Neĝadis. Sub la piedoj, la neĝo mezuris 60 centimetrojn. Formiĝis krusto el glacio. Kelkaj brigadoj da laboristoj rompis ĝin por eviti glitfalcjn. Densa nebulo kun polvo malfaciligis la spiradon. Ĉie estis aŭdebla raŭka bruo de radoj, rimenoj k militmaŝinoj, inter la vigla movado de triumfantaj soldatoj. Estas tiel fortaj la emocioj, ke oni ne povas ilin priskribi eĉ laŭ proksimuma maniero.

En nia hospitalo, kiu, kiel vi jam scias, estas nur ĥirurgia kliniko, ni devis zorgi pri amasego da malfeliĉaj geteruelanoj, kiuj venis al ni malsataj k soifaj, el la keloj de Teruel. Dum unu sola tago, ni konsumis 180 skatolojn da kundensigita lakto, kiun ni disdonis tuj, fluidigita kun akvo, en tasoj, ĉar kvankam la fuĝintoj nur petis akvon, ni ne volis lasi ilin sen iom da nutro k varmo por iliaj stomakoj. Cetere, ne mankas laboro por atenti la malamikajn soldatojn, kiujn la faŝistoj lasis sen kuraco, amasigitaj en la keloj dum unu semajno. La gangreno jam aperis en preskaŭ ĉiuj vundoj. Estis necese fortranĉi pecojn de putra karno en multaj ekstremaĵoj.

Plezure mi sciigas vin, ke antaŭ kelke da tagoj mi fordonis 300 gramojn el mia sango por vundito, kiu post ricevo de mia «ruĝaĵo» jam fartas multe pli bone. Pro mia humana servo, oni zorge flegas min k oni hávigas al mi kroman manĝon, kiun mi enbuŝigas ĉar, feliĉe, bona apetito ankoraŭ ne mankas...

Bonvolu saluti mianome ĉiujn ceterajn amikojn k vi ricevu fratan brakumon de via kamarado.

Ferdinando GUILLEM

## ABONMANIERO

Nia gazeto ne havas fiksan abonprezon. Ĝi eldoniĝas nur per laŭvola individua monhelpo de sia legantaro. Ni elektis tiun sistemon ĉar tiel, ĉiu kroma sumeto de tiuj, kiuj povas pagi iomete plie, ebligas la ricevon de agrabla legaĵo al multaj, kiuj pro senlaboreco, aŭ aliaj kaŭzoj, ne povas pagi sian propran kotizon. Tial, se la enhavo k celo de la revuo estas por vi aprobinda k plaĉa, pagu vian liberan abonon al iu ajn el niaj internaciaj agentejoj:

**ĜENERALA INTERNACIA ADRESO**
nur por mono
GUSTAVE FARENC
55, Rue Brise-Pain
Poŝtĉekkonto 13944 Orleans
ORLEANS (Loiret) FRANCIO

**NEDERLANDA ADRESO**
nur por mono de holandanoj
PETRO van der PLANK
Van Speijkstraat, 48-1
poŝtĝiro 245542
AMSTERDAM W. Nederlando

**BELGIO**
K-DO M. DELFORGE
33, Rue de Heigne
Poŝtĝiro 199106
CHARLEROI

**ANGLIO**
K-DO O. MELTON
23 Fowler Str. Nechells
BIRMINGHAM 7

**SVEDIO**
ARBETAR ESPERANTISTEN
Barnhusgatan 8 ö. g. n. b.
Poŝtĝiro n.° 53411
STOCKHOLM

REDAKCIA ADRESO POR ĈIO ALIA
**POPOLA FRONTO — Mar, 25, Valencia (Hispanio)**

## NIA MUNICIO

| | | |
|---|---|---|
| Valencia esperantistaro . . | 111 | ptoj. |
| A. S.—Callosa de Segura. . | 7 | » |
| F. M.—Barcelono . . . . | 50 | » |
| D. del P.—Madrido. . . . | 10 | » |
| F. S.—Centra fronto . . . | 10 | » |
| F. R.—Mahon. . . . . . | 20 | » |
| P. G.—Tejadillos . . . . | 10 | » |
| J. N.—Barcelono. . . . . | 2'50 | » |
| V. P.—Callosa de Ensarria. | 10 | » |
| R. B.—Ekstremadura fronto. | 100 | » |
| M. L.—Los Jeronimos. . . | 10 | » |
| P. V.—Huesca fronto . . . | 12 | » |
| F. R.—Sur Tajo. . . . . | 5 | » |
| A. S.—Base 8.ª . . . . . | 10 | » |
| R. G.—Base 8.ª. . . . . | 2'50 | » |
| A. P.—Albacete . . . . . | 50 | » |
| M. J B. D.—Terneuzen. . . | 0'25 | gd. |
| S. G. M. Veenwonden. . . | 1 | » |
| Poŝtista Esperantistaro. — Rotterdam. . . . . . | 4 | » |
| M. C.—Heerlen . . . . . | 1'50 | » |
| K. K.—Groningen . . . . | 0'50 | » |
| J. R.—Steenwijk. . . . . | 1 | » |
| J. M. H.—Alkmaar . . . . | 1 | » |
| FLE Sekcio. Zwolle . . . | 7'37 | » |
| FLE Sekcio. Zaandam . . | 3'51 | » |
| A. N.—Arnhem . . . . . | 1 | » |
| FLE Sekcio 10.-Amsterdam. | 1'02 | » |
| J. v. B.—Amsterdam . . . | 2 | » |
| P. A. v. E.—Arnhem . . . | 1'50 | » |
| K. K.—Leenwarden. . . . | 1 | » |
| Ch. R.—Saintes. . . . . | 15 | ffr. |
| F. D.—Saint Mathieu . . . | 20 | » |
| N. R.—Praha . . . . . . | 20'20 | » |
| J. V.—Mor. Ostrava . . . . | 20'20 | » |
| J. V.—Praha . . . . . . | 30 | » |
| J. P.—Lievin . . . . . . | 5 | » |
| J. P.—Plzen. . . . . . . | 50'51 | » |
| «Helponte». . . . . . . | 10 | » |
| A. P.—Parnu. . . . . . . | 39'37 | » |
| J. C.—Trainou. . . . . . | 7 | » |
| Gr. Esp. Ouvrier.—Orleans. | 3 | » |
| M. J.—Toulon. . . . . . | 10 | » |
| Y. V.—Campagne la Blanche. | 10 | » |
| E. A.—Narum. . . . . . | 3'50 | » |
| G. L.—Gien . . . . . . | 15 | » |

VOĈO DE LEGANTO

### POR SEKURA DUONMONATECO DE «POPOLA FRONTO»

Nun, kiam jam ekkomencis epoko de niaj ofensivoj, kiam nia Popola Armeo detruas en Hispanio internacian Faŝismon, estas nepre bezonata mondskala vera klarigo pri la okazaĵoj. Certe ĉiu P. F.-leganto opinias same! Komune ni, internaciaj esperantistoj, certe kapablos subteni k garantii ĝian duonmonatecon. Ni kapablas subteni P. F. tiom, ke ĝi povos aperi regule sur bona papero enhavante ankaŭ karakterizajn fotografaĵojn pri niaj venkoj.

Mi malfermas konkurecon por subteni P. F. tiucele, k mi anoncas ĉiumonatan sendon de almenaŭ *50 pesetojn*. Mi alvokas ĉiujn esperantistojn konkurenci laŭ ilia maksimuma povo. *Salud!*

A. PERSON
Internacia Brigadano

## AVIZETO

En Japanio aperas, ni ne scias ĉu regule, faŝista gazeto en Esperanto, je titolo LA SUNO.

Okaze de ĝia ricevo, ĉiuj amikoj de Ĉinio devas agi konsekvence!

## NI DUOBLIGU LA ELDONKVANTON!

Ankoraŭ multe pli da esperantistoj estus fervoraj legantoj k aktivaj propagandantoj de POPOLA FRONTO... se ili scius pri ĝia ekzisto. La tuja devo, de ĉiu amiko konscianta pri la rolo de nia gazeto, meze de la Esperanto-movado, estas donaci, aŭ nur simple montri, sian ekzempleron al iu alia esperantisto ŝatanta la liberecon.

Se vi atentas nian rekomendon, certe ni, senplende, baldaŭ laboros duoble...

## POPOLFRONTA LETERUJO

J. B. — Londono. — Kun ĉiama ĝojo ni ricevas viajn sciigojn. Ree ni salutas vin tutfrate. Ĝis revido!

Z. S. — Tours. — Vian leteron, kun respondkuponoj ni ricevis k dankas. Koran saluton al bonaj amikoj, kiel vi!

J. N. Zwolle.-Ni ricevis vian leteron kun listo. Kun danko ni kvitancas vian monsendon al nia peranto. Viajn indikojn ni zorge notas. Ni reciprokas viajn varmajn salutojn.

I. E.—Cardiff.—Bedaŭrinde ni ne sukcesis sendi al vi la deziratajn p. m. Se eblas ni aranĝos la aferon. Tutkoran saluton.

## INFORMEJO

### ONI SCIVOLAS PRI:

K-do H. G. van Rees, nederlandano, kiu venis Hispanion k batalis en Internacia Brigado. De la monato Marto 1937, oni scias nenion pri li.

K-do Gaston Sabbe (Belgo), kies lasta adreso estis S. R. I., Ĉambro 63, Albacete.

K-do Louis Marcel Lombard, kies lasta adreso estis: S. R. I., 580, C.—1, plaza Altozano, Albacete.

### ONI INFORMAS, KE

La nova adreso de k-do Jose Molina Bolinches estas: Estado Mayor. 39 Division, Base Sexta, C. C. n.° 13. Li informas al k-do Sergo Ĉaĉiu, Miĉuriuse (U.R.S.S.) ke li ricevis k respondis lian leteron.

## ATENTU!

K-do Vilĉjo Verda, 50 Selkirk Road, Tooting, S. W. 17, Anglio, sciigas ke, se iu el la legantoj de POPOLA FRONTO sendos al li ekzempleron de la numero 2, de la unua jaro, li sendos 2 ŝilingojn k 6 pencojn al la municio-kaso de nia gazeto.

## KORESPONDADO

**Simpla trilinia anonceto 4 f. fr.**

ĈEĤOSLOVAKIO.—K-dino Franjo Richter, scivolas ĉu k-do Bautista Garcia, el Sueca, ricevis ŝian respond-leteron.

SOVETIO. — Ilja Dimŝic. Poŝtkesto 305 «Esperanto», Leningrad, dez. kor. k. ĉ. l. pri diversaj temoj.

HISPANIO. — M. Torras Busquets, Torrijos 20, 1.°, Barcelona, dez. interŝanĝi poŝtkartojn, ilustritajn revuojn k ĵurnalojn kun tutmondaj junuloj. Certa respondo.

HISPANIO. — Javier Nagore, Salmeron 56 pral., Barcelona, dez. interŝanĝi korespondadon kun la tuta mondo per il. P. K.

HISPANIO.—Tri junaj hispanaj kamaradoj dez. korespondi kun k-dinoj en ĉiuj landoj. Iliaj nomoj estas:

M. Torras Busquets
Guzman Escartin
Carles Puig
Esperanta Societo «Paco kaj Amo»
Juneca Fako
Salmeron 56, pral. Barcelona

HISPANIO. — K-do Manuel Sala, 142 Brigada, 567, batallon, Transmisiones, Base 8. C. C. 11 deziras korespondi.